Por ke junaj aktivuloj en Afriko povu konstrui pli fortan kaj grandan Esperanto-movadon, ili bezonas renkontiĝi, interŝanĝi spertojn kaj vere senti Esperantujon. Tian eblecon ili bedaŭrinde ne havas pro vizaj problemoj kaj financaj

limigoj. Pro tio Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) decidis veni kun sia ĉefa evento al Afriko kaj organizi interkapabligan projekton. Restas do solvebla parto – kolekti financajn rimedojn por venigi aktivulojn de afrikaj landoj al la evento. Detaloj ĉe

<http://tejo.org/agado/ni-realigu-la-unuan-ijk-n-en-afriko/>

Volontulado en Esperantujo

TEJO pretigis subpaĝon en sia retejo pri la volontulebloj en Esperantujo. Se oni pretas dediĉi sian tempon por evoluigi laborojn de Esperanto-organizoj, por disvolvi E-projektojn, por sperti vivon en alia lando, ekkoni novajn esperantistojn, pliboniĝi en Esperanto kaj lerni novajn aferojn, la retejo klarigas kiel fari tion. Volontula laboro daŭre restas ĉefa motoro de progreso de Esperantaj projektoj kaj de funkciado de Esperanto-organizoj. Ĉiu volontulado generas tamen iujn kostojn, kion devas alfronti la gastigantaj organizoj. Bonŝance aperas eblecoj por kovri tiujn kostojn. Ĉiujn gravajn informojn pri la eblo volontuli por Esperanto oni trovos ĉe: <http://tejo.org/volontulado>

La 5an de decembro estas la Tago de Volontuloj. TEJO havas momente kvar volontulojn, kaj por festi tiun internacian tagon *La Ondo de Esperanto* intervjuis la plej novan membron de la teamo: Ana Stretcu. Ŝi estas 26-jara sociologo el Rumanio.

Legu la intervjuon: <http://sezonoj.ru/>


La januara Ondo senpage legebla

Ekde la jarŝanĝo unu el la plej popularaj internaciaj Esperanto-gazetoj, “La Ondo de Esperanto”, ne plu aperas en papera formo, sed nur elektronike. La 30an de decembro 2016 en la elŝutejo de “La Ondo de Esperanto” aperis la januara numero de ĉi tiu revuo, kiu nun ne plu aperas papere, sed estas eldonata kiel bitgazeto (elektronika gazeto) laŭ la popularaj normoj “pdf” kaj “ePub”. Dum la posta semajno la abonantoj jam elŝutis la januaran “Ondon” aŭ ricevis ĝin perpoŝte, kaj la redakcio de “La Ondo de Esperanto” sojle de la orient-kristana Kristnasko disponigis ĝin senpage, por ke ĉiu deziranto povu legi ĝin kaj decidi pri (ne)abono. “La Ondo de Esperanto” (11 numeroj + literatura suplemento) estas abonebla kontraŭ nur 15 eŭroj.

(<http://esperanto-ondo.ru/Libro/Libro.php>)

6-a Afrika Kongreso de Esperanto

La 31-an de decembro 2016 finiĝis la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA, kiu komenciĝis la 24-an en la tanzania urbo Bunda kun 74 partoprenintoj el 14 landoj. Krom la afrikaj landoj Burundo, DR Kongo, Kenjo, Ruando, Sudafriko, Tanzanio, Togolando, Zambio, estis reprezentitaj ankaŭ Brazilo, Francio, Hungario, Islando, Japanio kaj Koreio. Okazis AMO-seminario kun 40 partoprenantoj sub la gvido de Stefan MacGill, Jérémie Sabiyumva kaj Adje Adjevi. Sekvis prelegoj, vizito al la ekspoziciitaj Esperanto-verkaĵoj kaj futbala matĉo. La publiko de la matĉo daŭre aŭdis la vorton ‘Esperanto’, ĉar la matĉo, same kiel la kongresa malfermo, estis rekte elsendataj en la svahila kaj Esperanto de la loka radio-stacio Mazingira FM, kiu kovras rondon de 100 km. Okazis ankaŭ ekzamenoj de UEA/ILEI. Laŭ la statistikoj de la ĝisnunaj Afrikaj Kongresoj de Esperanto, la nombro de la partoprenintaj landoj al la sesa



kongreso kaj la nombro de la prelegoj kaj aliaj programeroj estis la plej altaj kaj variaj ĝis nun.

(Adjé Adjévi, kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA, adjevia@gmail.com)

Aktivulo.net: retejo por aktivuloj

Kiel plia paŝo en la renovigo de la retejoj de UEA lanĉiĝas nun nova paĝaro: *aktivulo.net*. Frukto de longa laboro fare de Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova, laŭ instigo kaj gvido de la Vicprezidanto de UEA, Stefan MacGill, la nova retejo celas subteni niajn aktivulojn tutmonde per valoraj informoj kaj kontaktebloj. Unu el la kernaj celoj de la paĝaro estas provizi kaj arkivi informojn pri la Seminarioj por Aktivula Maturiĝo — agado, kiu jam gajnis por MacGill la honoran titolon Esperantisto de la Jaro 2016. Per kolektado de la materialoj kaj rezultoj de la seminarioj, UEA celas iom post iom krei ampleksan sciobankon por diversspecaj bezonoj sur la agadkampoj Konsciigo, Kapabligo, Komumuno kaj Kunordigo. Krome la retejo enhavas la rezultojn de strategiaj FLAM-analizoj el diversaj aranĝoj, landaj kaj internaciaj, kaj la kolekton de la Estraraj Komunikoj (EKO-komunikoj) pri la agadoj de UEA en la lastaj kelkaj jaroj. Novaĵo estas Asocia Bloga, kiu celas doni kanalon por rekta informado pri la faroj, spertoj kaj vidpunktoj de diversaj aktivuloj, inkluzive de oficistoj kaj volontuloj en la Centra Oficejo, estraranoj kaj komisiitoj.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA, www.uea.org)

Pasporta Servo denove aperos papere

La plej grava servo de TEJO post la demisio de la multjara prizorganto en 2008 ekhavis grandajn problemojn, sed nun la aferoj ŝajnas ordiĝi. Post kvinjara paŭzo la listo de gastigantoj de Pasporta Servo denove aperos en presita formo. Jam eblas antaŭmendi la paperan liston. Inter 1995 kaj 2008 la gastiga reto estis akurate administrata de Derk Ederveen, kiu poste estis nomumita honora membro de TEJO pro siaj valoraj servoj. Tamen la transiro al novaj respondeculoj kaj al la reta epoko ne okazis glate. En 2008 la listo de gastigantoj havis 1.225 adresojn en 90 landoj. Sekvajare tute ne aperis la papera listo, kaj en la nova retejo, kiu krome senanonce ŝanĝis sian propran adreson, restis nur 416 gastigantoj. Lastfoje la presita listo de gastigantoj aperis en 2011, kaj ankaŭ la retejo dum periodoj ne funkciis kontentige. En 2014 nova volontulo, Baptiste Darthenay, komencis programi tute novan retejon por Pasporta Servo. Ekde septembro 2016 li estis dungita de TEJO dum kvar monatoj por okupiĝi pri programado. Same

en la aŭtuno de 2016 TEJO helpe de EU-subvencioj por kvar monatoj dungis Eszter Besenyei-Merger (pli konatan kiel Stela) kiel merkatikiston. Ŝi multe laboris por atentigi la publikon pri Pasporta Servo, kaj ŝajne sukcese, helpe de landaj kunordigantoj — nun la retejo listigas pli ol 1.400 gastigantojn. Intervjuo kun Baptiste kaj Stela aperis ĉe Libera Folio.

(www.liberafolio.org)

Ĉu ekzistas du movadoj?

Miloj da homoj lastatempe eklernis Esperanton en la reto, sed ili apenaŭ videblas en la fizika mondo. En sia teksto Robert Nielsen pripensas, ĉu ekzistas du apartaj Esperantujoj — kaj ĉu eblas ilin kunigi.

(www.liberafolio.org/2016/12/14/cu-ekzistas-du-movadoj/)

Nova ampleksa romano en Esperanto el Slovenio

Okaze de Zamenhoftago, prifestita la 10-an de decembro en Maribor, kiun ĉeestis pli ol 30 slovenaj esperantistoj, interalie estis prezentita nove aperinta romano *Doberdo* de Prežihov Voranc, unu el la plej gravaj slovenaj prozistoj. La preskaŭ 400-paĝan romanon esperantigis Vinko Ošlak (Karintio, Aŭstrio) kaj lektoris Jozef Horváth (Hungario). Temas pri epoka romano pri soldata vivo dum la unua mondmilito. Ekzistas opinioj, ke ĝi staras samnivele kun la famaj tiutemaj romanoj de Remarque kaj Hemingway. Ĉiukaze monumenta verko, bele bindita kaj reprezenta. La libron prezentis kaj parolis pri ĝi kaj ĝia aŭtoro Vinko Ošlak. La eldonon financis Fondaĵo Prežihova Ustanova en naskiĝurbeto de la aŭtoro Ravne na Koroškem. Kuneldonis Esperanto-societo Maribor.

(Zlatko Tišljar, *Eŭropa Bulteno*,

<http://www.europo.eu/>)

Nova interreta kurso: Learn.esperanto.com

Nova kursejo sub supra retadreso, kreita de Georg Jähnig, celas laŭeble rapidan enkondukan praktikan kurson, kiu ebligas la plej eble rapidan lernadon de tuj uzebla Esperanto. Ĝi uzas la Zagrebmétodan enhavon, bazitan je 500 plej oftaj morfemoj uzataj en parolata lingvo. Ĝia kroma kvalito estas, ke ĝi daŭre aperas en novaj kaj novaj lingvoj, kaj estas ŝanco ke ĝis la sekva somero jam per ĝi povos lerni komencantoj en trideko da lingvoj. Pro la identaj materialoj (leciontekstoj, gramatikeroj, vortaro kaj ekzercoj) ĝi ebligas samtempan lernadon de pluraj personoj en diversaj landoj kaj reciproke kontaktadon, ĉar ili regas la saman lingvonivelon. Diference de Duolingo ĝi klarigas la gramatikon al la kursanoj en ilia nacia lingvo. Jen kelkaj indikoj pri ĝi, prezentitaj de Georg Jähnig: Ni nun havas proksimume 4600 vizitantojn monate. La plej uzataj lingvoj en la lasta monato laŭvice: 32% portugala, 21% angla, 14% hispana, 5% germana, 4% ĉina.

(Zlatko Tišljar, *Eŭropa Bulteno*, <http://www.europo.eu/>)

(Kolektis kaj prilaboris Uwe Stecher)

Kalendaro

Marto 2017

03 – 05: Studsemajnfino en Stevensbeek, Nederlando.

Esperantaj ursoj en diversaj niveloj. Inf.: Esperanto Nederland, Arubastraat 12, NL- 9715 RW Groningen, Nederlando. Rete: studsemajnfino@esperanto-nederland.nl

04 – 11: Mediteranea Esperanto Semajno = M.E.S.2017 en Les Issambres en Restadejo Val d'Esquière (Lazura Marbordo), Francio. Ĉu ankoraŭ frostas en via regiono? Venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj! Vin atendas amika familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro... – kursoj, ekskursoj, distraj vesperoj. Inf.: Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR-83700 Saint-Raphaël, Francio, rete: prezmoni@hotmail.com, tel.: +33(0)4 94 83 06 88 aŭ Christine Graissaguel, Les Iles d'Or, rue du Progrès, FR-83600 Fréjus, Francio, rete: kris_grai@hotmail.fr, tel.: +33(0)4 94 95 66 18

17 – 19: 11-a BIERo en Náchod, Ĉeĥio. Promenoj, ekskursoj, ludoj... (Bonvolu ne peti invitleteron.). Inf.: rete: E-mental'; [e-mentalprago\(ce\)seznam.cz](mailto:e-mentalprago(ce)seznam.cz)

17 – 19: Semajnfina lingvokursoj en Herzberg am Harz, Germanio. Diversnivela Esperanto-kursoj (A1-B2), intensa lernado, multe da konversaciado. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, 6 Grubenhagenstr., DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Rete: esperanto-zentrum@web.de

21 – 31: SemEo – Semajno de Esperanto en Toulouse, Francio. Semajno por festi kaj ĝui nian lingvon. Okazos prelego de Chuck Smith pri Amikumu, stud-kurso, speciala radio-elsendo kaj koncerto de IDC. Inf.: Esperanto-Centro de Toulouse, rete esperanto.toulouse@free.fr

24 – 26: Printempa Esperanto-Kunveno 2017 en Amougies, Francio. PEKO estas LA okazo por esperantigi viajn amikojn kaj familianojn. NEPRE invitu viajn amikojn, genevojn, genepojn, najbarojn, E-lernantojn... Ni ofertas senpagan partoprenadon al la 10 unuaj adoleskuloj – kiuj-neniam-partoprenis-E-eventon!. Inf.: Centre Protestant d'Amougies, Verte Voie, 16, FR-7750 Amougies, Francio

Aprilo 2017

03 – 07: Staĝo pri tradukado en Bouresse, Francio. Kun Brian Moon. Tradukadon necesas aparte ekzerci, kaj dum tiu ĉi semajno ni faros ĝuste tion, esperantigante francajn tekstojn plej diversajn. La celo estas tradukado altnivela, sed ankaŭ plibonigo de la lingva nivelo en Esperanto, ĉar analizi tradukproblemojn povas konduki ankaŭ al lingvolecionoj. Partoprenantoj de diversaj lingvoniveloj estos do bonvenaj. Inf.: KVINPETALO Esperanto-Centro, 4 rue du Bureau, FR-86410 BOURESSE, Francio. Tel.: +33(0)549 034 314. Rete: informoj@kvinpetalo.org

05 – 09: Korusa renkonto de Interkant' en Baugé, Francio. Inf.: Esperanto-Kastelo Greziljono, MCE Grésillon, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio. Rete: kastelo@gresillon.org

10 – 14: Pedagogia staĝo en Bouresse, Francio. Katalin Kováts, redaktoro de edukado.net kaj sperta trejnisto de Esperanto-instruistoj gvidos 5-tagan seminarion celantan pripensi kaj praktike prepari intervenojn enkadre de TAP/NAP en la elementaj lernejoj, kaj atelierojn en gimnazioj kaj liceoj. Inf.: Kvinpetalo, 15 rue du Lavoir, FR-86410 BOURESSE, Francio. Rete: informoj@kvinpetalo.org

10 – 17: Printempa Semajno Internacia en Essen, Germanio: Printempa, familia kunveno kun ekskursoj, prelegoj kaj kursoj por plenkreskuloj kaj infanoj, malferma por ĉiuj generacioj. Inf.: Germana Esperanto-Asocio, Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin, Germanio. Rete: petra.dueckershoff@esperanto.de

12 – 18: 41a Internacia Junulara Festivalo en Castione della Presolana, Bergamo, Italio. Ĉu vi volas viziti la belajn montarojn de regiono Lombardio en vilaĝo sufiĉe eta por esti trankvila kaj sufiĉe maleta por havi ĉion bezonatan? Kaj fari tion loĝante en ĉarma kaj komforta feridomo, malmulte pagante kaj tre multe amuziĝante? Do venu al la Internacia Junulara Festivalo 2017, la plej fama junulara esperanta renkontiĝo en Italio! La ĉi-jara temo rilatas al internacia paco kaj milita kaj religia. Estas grave kaj rimarkinde, ka la 14an de aprilo estos la centjara datreveno de la morto de Zamenhof, kaj do speciala tago estos organizita honore al li. Inf.: Informitale, Itala Esperanto-Federacio fei@esperanto.it, Itala Esperantista Junularo, iej@esperanto.it, via Villorosi, 38 IT-20143 Milano, Italio, Tel/fax.: +39 02 58100857

13 – 15: 78a GEA-Studmodulo en Herzberg am Harz, Germanio. Prelegoj, diskutado, multe pri Zamenhof, la familio, historio, politiko, ktp. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, 6 Grubenhagenstr., DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Rete: esperanto-zentrum@web.de

14: Memortago "Doktoro Zamenhof" en Herzberg am Harz, Germanio. Memortago okaze de la 100a datreveno de la morto de L. L. Zamenhof. Inaŭguro de ekspozicio pri Zamenhof en la Esperanto-ĉambro en la Kastela Muzeo. Memorhoroj kun fotoj, albumoj, kunveno kun festo ĉe la Zamenhof-monumento. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, 6 Grubenhagenstr., DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Rete: esperanto-zentrum@web.de

14 – 22. aprilo: 7-a PRINTEMPaS en Baugé, Francio. Intensaj kursoj kun Zsófia Kóródy el Herzberg, Marion Quenut kaj Christophe Chazarein el Toulouse, konferencoj kun Mireille Grosjean. Inf.: Esperanto-Kastelo Greziljono, MCE Grésillon, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio. Rete: kastelo@gresillon.org

15 – 18: Satamikara kongreso en Nanto, Francio. Kongreso de la laboristaj esperantistoj ĉefe el Francio sed malfermita al ĉiuj. Inf.: lucette/lumeto éCHAPPÉ 44230 saint sébastien sur loire, rete: lucette.lumeto@laposte.net

21 – 22: KER-ekzamenoj dum PRINTEMPaS en Baugé, Francio. Internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1) post intensaj kursoj. Inf.: Esperanto-Kastelo Greziljono, MCE Grésillon, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio. Rete: kastelo@gresillon.org

23 – 28: 4-a Printempa Migrado en Pontarlier, Francio.
Migrado en montaro Ĵuraso por ĝuemaj esperantistoj! Inf.: Olivier BUISSON, 4, rue Paul Lippe, FR-21000 Dijon, Francio.
Rete: obuisson@live.fr

28 – 30: Zamenhof – 100 en Varsovio, Pollando. Solenado okaze de 100-a mortodatreveno de L.L.Z.: prelegoj, ekspozicio, promenado laŭ spuroj de Ludoviko. Multlingva legado de libro en Zamenhof-strato. Solena ceremonio ĉe la tombo de la Majstro. Bonvenon al Varsovio kie Zamenhof vivis, laboris, kreis Esperanton kaj ripozas por eterne. Inf.: Pola Esperanto Asocio, PZE ul.gen.W. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa, Polska. Rete: paeastraro@gmail.com

28 apr – 01 maj: 4-a Centrejo en Bartošovice, Ĉeĥio. Junulara renkontiĝo en orienta Ĉeĥio, en belega kastelo de la urbeto. Okazos diversaj ekskursoj, trejnadaj, ligvaj kursoj, amuziĝo... – simple bunta programo por ĉiuj. Ne mankos unuamaj festumado. Inf.: ĈEJ, s. Haškova 2, CZ-638 00 Brno, Ĉeĥio.
Rete: mladez.esperanto.cz

28 apr – 01 maj: Krokodila Renkontiĝo en Arrout, suda Francio. Internacia renkontiĝo en vilaĝo de la pirinea montaro. Nokta stelumado, botanika promenado, debatoj, ludoj, diskutoj... Ĉiu partoprenanto sentu sin libera proponi aktivecon. inf.: Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo, 31, rue Franc, FR-31000 Toulouse, Francio. Rete: esperanto.toulouse@free.fr

Majo 2017

01: Ponta Festo en Frankfurt (Oder), Germanio. Informstando dum publika aranĝo kun distraĵoj. Inf.: EABB – Ronald Schindler, rete: RonaldSchindler@web.de

16 – 23: Kongreso de IFEF, Internacia Fervoja Esperanto-Federacio, en Colmar, Francio. Jara kongreso de IFEF kun fakaj kunsidoj kaj ekskursoj en orient-Francia regiono Alzaco. Inf.: André Grossmann, 5 rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim, Francio. Rete: laurent.vignaud@free.fr

18 – 22: Interkultura Majrendevuo en Vroclavo, Pollando. El la programo: urba kaj ŝipa promenado, koncerto, prelegoj, poliglota lingvokurso, kreado de hajko-poemoj. Inf.: Małgosia Komarnicka Centro de Interkultura Edukado – Vroclavo, rete: informado.eo@gmail.com

19 – 21: Brita kaj Skota Kunkongreso de Esperanto en Edinburgo, Skotlando. Esperanto-Asocio de Britio kaj Esperanto-Asocio de Skotlando kunmetas siajn naciajn kunvenojn en unusolan kunkongreson en 2017! Edinburgo gastigos la plej grandan Esperanto-kongreson en Britio, la 98-an britan kaj 112-an skotan. Transmaraj vizitantoj ne devas pagi kotizon. Inf.: Tim Owen, rete: tim.owen@esperanto.org.uk

20 – 21: Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj en Wrocław, Pollando. La Festivalo okazas ĉiujare en majo en du kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo / 2. solisto. Ĉiu partoprenanto kantas du kantojn: unu en Esperanto, la alian en sia nacia aŭ fremda lingvo. Pritaksataj estas nur Esperantaj kantoj. La festivalon patronas la urbestro de Wrocław. La premiitoj ricevas diplomojn

kaj pokalojn kaj ĉiuj partoprenantoj ricevas diplomon pro la partopreno. Inf: Małgosia Komarnicka, rete: informado.eo@gmail.com

24 – 28: BARO (inkl. Ĉieliro, 25. majo) en Bad Münden, inter Hannover kaj Hameln, Germanio. Multaj venas kun siaj infanoj. Ni babilas, ludas, festas, eluzas la eblojn de la granda herbejo kaj la rivereto kaj faras lignan fajron.

25 – 28: AMO LIMA en Les Brenets, Svislando. Aktivula maturigo por instruistoj kaj neinstruistoj. Gvidos ĝin K. Kováts, M. Molnár kaj M. Grosjean. Inf.: ILEI UEA, Mireille Grosjean, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. Rete: mirejo.mireille@gmail.com

25 – 28: Sveda Esperanto-kongreso en Forsvik, Svedio 58°34'36"N 14°26'12"Ö. Renkontiĝo de svedaj esperantistoj en historia urbeto. Turismado kaj jarkunvenoj de svedaj esperanto-organizoj. Inf.: Sveda Esperanto-Federacio, Svenska Esperantoförbundet, Box 2276, SE-103 17 Stockholm, Svedio. Rete: svenska@esperantoforbundet.se

25 – 28: Franca kongreso de Esperanto 2017 en la urbo Mandres-les-Roses (departemento Val de Marne), 25 km sud-oriente de Parizo. Ĉu vi scias, ke tiu departemento famas pro siaj dancetrinkejoj "guinguettes" ĉe la bordo de la rivero Marno? Venu por danci kaj aŭskulti muzikbandon dum tipa vesperfesto. Krome, pluraj francilanoj (anoj de la loka regiono) kunhavigos siajn pasiojn per prelegoj, koncertoj, manlaborgrupoj. Informoj ĉe: Loka Organiza Komitato, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris, Francio. Tel: +33 (0)1 42 786 886, rete: kongreso2017@esperanto-france.org

25 – 28: Ĉielira Kunkantado en Parthenay-Secondigny, Francio. Esperanto 79 invitas vin kunkantadi, kanti kun loka koruso kaj malkovri la legendan regionon ĉirkaŭ Parthenay kun la Kompanoj kiuj spektaklis dum la nacia vespero de la 100a UK en Lilo en 2015. Inf.: Esperanto 79, 10 rue Pasteur, FR-79200 Parthenay, France. Rete: esperanto79.asso@gmail.com

27: Malgranda landa Ĝardenekspozicio en Pfaffenhofen, Germanio. Okaze de la kleine Landesgartenschau naturo en la urbo en Pfaffenhofen ni invitas ĉiujn Esperantistojn al Esperanto-renkontiĝo al la ejo de la ekspozicio. Ni (Josef und Roland) verkos tradukon enmetanta en la prospekton de la ekzpozicio. Se eble ni disdonos la prospektojn ĉe diversaj renkontiĝoj kiel invito. Inf.: Esperanto-lingvo-klubo Pfaffenhofen, Judith Neumair, Winden 7, DE-85298 Scheyern, Germanio. Rete: judith.neumair@pfaffenhofen.de

Junio 2017

02 – 05: 94-a Germana Esperanto Kongreso kun EEU-Kongreso en Freiburg, Germanio. Temo: Milito kaj Paco. Riĉa kulturprogramo, sep ekskursoj, Zamenhof-memorifesto okaze de la 100-a morto-datreveno. Rete: www.esperanto.de/de/enhavo/gea/94-deutscher-esperanto-kongress-2017

Aktualaj informoj ankaŭ ĉe:
<http://www.eventoj.hu/2016.htm>

Nova Rege-albumo „Kreaktiva“ de Jonny M haveblas

La fameco de la juna rege-kantisto Jonny M jam komenciĝis en la jaro 2010, kiam lia unua kanto „En somero“ publikiĝis en la interreto.

Kunlaborado kun la Esperanta muzikeldonejo VINILKOSMO sekvis, kaj aperigis tri jarojn poste la unuan albumon „Regestilo“. La enkondukita teksto priskribis ĝin tiel: „Kiel unuigi eŭropan pensmanieron kun jamaikaj melodioj? Jen Jonny M kun sia nova albumo“. Ĝi disvastiĝis rapide kaj ebligis al la artisto koncertojn tra la tuta mondo, interalie Japanio, Francio kaj Slovakio.

Ankaŭ en Germanio li konstante koncertis, ekzemple dum la Junularaj Esperanto-Semajnoj (JES) kaj dum la ceremonio por la FAME kulturprezo, kiun honoris Utho Maier kaj la Esperanto-biblioteko en Aalen. Aliaj gravaj sukcesoj estis lia prezento dum la centa Universala Kongreso (UK) en Lilo kaj la koncerto en la „Schlachthof“ dum la Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Visbadeno.

Post tia varbvojaĝo li sin retiris por fari kreeman paŭzon kaj koncentriĝi por novaj kantoj. Kelkajn jarojn li donis malmultajn koncertojn. Grava mejlŝtono estis la invito al la Trilanda Esperanto-Renkontigo en Bandung, Indonezio. Ĝi helpis plidivulsiĝi sian repertuaron al aziaj esperantistoj.

En tiu tempo li kreis multajn novajn kantojn kaj komencis registri ilin en la sonstudio. La laboro estis akompanata per filmilo. Kiam sufiĉe da novaj kantoj kolektiĝis, li anoncis la publikigon de nova albumo januare 2017 dum JES en Waldheim ĉe Brahmsee.

La kantotekstoj nun estas haveblaj sub la "kantolisto" ĉi tie: <https://jonny-m.org/kreaktiva>



La nova albumo estas duobla albumo, kiu ne nur enhavas dek kvar freŝnovajn kantojn kiel KD, sed ankaŭ dokumentaĵon pri la verkado de la albumo, muzikvideojn kaj aldonajn sur DVD. Li sukcesis kunlabori kun tri gravaj aliaj Esperanto-muzikistoj, nome La Perdita Generacio, Dolĉamar kaj jOmO.

Muzike, la albumo „Kreaktiva“ estas mikso inter dancigaj ritmoj, facile enkapigeblaj melodioj kaj pripensindaj tekstoj. Politikaj kantoj kiel „Ribelluloj“ rotacias kun festemaj kantoj kiel „Ni estas fortaj“.

Ankaŭ personaj kantoj („Por mia patro“) troviĝas, en kiu li laŭdas la agadon de sia mortita patro. „Bam Bam“ estas kanto pri vegetara kaj vegana manĝmanieroj, en kiu li klarigas la kaŭzojn kaj necesojn, kial pli kaj pli da homoj en Eŭropo kaj aliaj lokoj ŝanĝas sian vivstilon. Kvankam tiu kanto sufiĉe diskutindas, ĝi estis vaste akceptita en la unua koncerto. Aldonindas, ke en la lasta JES (kie lia albumo oficiale aperis) aliĝis pli da vegetaraj manĝantoj ol viandmanĝantoj.

En la jaro 2017 sekvis multaj koncertoj de Jonny M en aranĝoj precipe tra Eŭropo, en kiuj li prezentos la novan albumon. Se vi jam volas havi pli da informoj, provaŭskulti la kantojn aŭ subteni lian junan talenton kaj Esperanto-agadon per aĉeti la novan verkon, bonvole vizitu www.jonny-m.org/kreaktiva. Se vi ne estas interrete aktiva, demandu vian lokan libroservon pri la albumo!

Listo de liaj sekvontaj koncertoj, aliajn informojn kaj pli da muziko de Jonny M ankaŭ haveblas je www.jonny-m.org.

Elwira Fabian



8a Junulara E-Semajno (JES)



**okazis de la 28a de decembro 2016
ĝis la 4a de januaro 2017
en Waldheim am Brahmsee
en norda Germanio**

Unterstützerkreis für die DEJ

Während des JES (Junulara E-Semajno) in Langwedel (Schleswig-Holstein) kam die Idee auf, einen Unterstützerkreis (UK) für die Deutsche Esperanto Jugend (DEJ) und ihren Bundesvorstand ins Leben zu rufen.

Junge Leute, besonders wenn sie Verantwortung übernehmen, wie der frisch gewählte Bundesvorstand, stehen vor einem Berg neuer Aufgaben und Informationen.

Damit sie nicht das Rad neu erfinden müssen und auch schwierige Aufgaben gut meistern, möchte der UK die jungen Aktiven der DEJ in allen Feldern der Verbandsarbeit beraten und begleiten. So ist bisher Hilfe in den Bereichen Organisation, Internet, Finanzen, Öffentlichkeitsarbeit und Veranstaltungsorganisation andiskutiert worden. Auf dem JES fanden die ersten Gespräche und Planungen statt. Nun folgen die Vernetzung und der Aufbau der Strukturen. Der UK besteht aus EsperantistInnen, die aus Altersgründen selbst nicht mehr der DEJ angehören, aber eine starke Verbindung zu ihr haben und möchten, dass sich der Verband auch weiterhin gut entwickelt. Dabei ist es egal, ob potentielle UnterstützerInnen wenig oder viel Zeit für ihre Hilfe aufbringen können. Auch Leute mit wenig Zeit werden gut integriert.

Infos vom Unterstützerkreis und seiner Arbeit gibt es ab sofort regelmäßig in jeder Ausgabe von "Esperanto aktuell!"

Wer selbst aktiv werden möchte oder weitergehende Informationen möchte, wende sich an den Bundesvorstand der DEJ oder an

Hartmut Koblichke (Marsi)
Magdeburg
Tel: 0178-7650347
eMail: e@biovendo.de

Fahrtkostensubventionierte Treffen im Jahr 2017

- IJF in Italien (12.-18. April)
- SES in der Slowakei Banská Štiavnica 15.-23. Juli
- UK in Seoul, Korea (22.-29. Juli)
- IJK in Togo (05.-12. August)
- JES Polen



Severin Seehrich

Mi estas Severin', kaj mi venas el kaj studas en Germanio. Filozofion mi studas por kompreni la mondon ĉirkaŭe kaj ene, kaj ĉar nekredeble plezurigas min parkerigi gramatikajn librojn, mi studas la malnovgrekan. Mi komencis lerni Esperanton dum la aŭtuna KEKSO en 2014, kaj vizitis ĉiujn sekvajn JES-ojn kaj IJK-ojn ekde tiam. Do per Esperanto mi jam vojaĝis ene de Germanio, al Pollando kaj al Hungario.

Malgraŭ ke dum JES 2016/2017 mi okazigis novulan programon, mi ankoraŭ devas konatiĝi kun kaj parkerigi ĉiujn mallongigojn, kiuj jam ŝajnas esti baza parto de la ĉiutaga vivo de Konstanze.

Tial mi ankaŭ havas du ĉefajn celojn en la GEJ-estraro, pri kiuj mi tute bone kapablos okupiĝi jam antaŭ ol tiu lernado finiĝos: Unuflanke mi volas laŭeble plej bone bonvenigi kaj prizorgi komencantojn, kiuj konas eĉ malpli da Esperantujaĵoj ol mi. Aliflanke mi celos prizorgi la kreeman reprezentadon de kaj klerigadon pri enhavecaj temoj kiel genra egaleco, rasismo, antisemitismo ktp por eĉ pli moĝosigi kaj sentemigi Esperantujojn. Por la unua celo mi planas kunorganizi la jam antaŭe okazintajn KEKSOjn, kaj por la dua mi planas kune kun aliuloj okazigi specife feministan kaj GLAT*an (GejanLesbanAmbaŭseksemanTransgenrulanKtp-an) Esperanto-kunvenon.

Mi antaŭĝojas frukto- kaj ideodonan kunlaboron (kaj eble kunteamadon?) kun vi ĉiuj!



Konstanze Schönfeld

Mia nomo estas Konstanze, origine mi venas el Italio sed translokiĝis al Germanio antaŭ pli ol kvar jaroj por iĝi studento de la Universitato de Hajdelbergo. Nuntempe mi loĝas en Japanio, kie mi partoprenas en ŝanĝprogramo kun la Kjuŝu Universitato en Fukuoka.

Esperanton mi lernis en Germanio dum majo 2014; tuj poste mi partoprenis la Poliglotan Renkontiĝon en junio 2014 kaj FESTOn en aŭgusto 2014 per subvencio de IEJ. Dum ambaŭ renkontiĝoj mi konatiĝis por la unua fojo kun esperantoparolantoj, kaj amikiĝis kun pluraj movadanoj, kiuj tuj enkondukis al mi agadon de TEJO kaj landaj sekcioj. Ekde tiam mi okupiĝis pri diversspecaj projektoj, ĉefe en TEJO, interalie pri kunordigo de la tradukado de la repaĝo kaj EVS-subvencipetado 2015. Plie, fine de 2015 mi iĝis grupestro kadre de la partnerado kun FoJE por realigi EJOn (European Youth Event) 2016.

Kvankam mi nuntempe loĝas iom for de Eŭropo, mi nun estas estrarano de GEJ, por povi daŭre kontribui al Esperanta movado. Precipe, mi respondecas pri projektoj kun TEJO kadre de subvencioj de Eŭropa Unio kaj mi volas kontribui al la organizado de KEKSOj kaj JES.

Julia Berndt

Saluton, mia nomo estas Julia kaj mi estas estrarano de GEJ jam ekde du jaroj. Mi esperantistiĝis en 2012 dum KEKSO. Tuj poste mi vojaĝis al SES, kaj la etoso de tiu renkontiĝo konvinkis min partopreni pliajn renkontiĝojn kaj en 2014 estraraniĝi por mem kontribui al la movado.

Plejparte mi zorgis kaj zorgas pri la repaĝo de GEJ (kies nova strukturo espereble baldaŭ videbliĝos!), kunlaborante kun GEA-membroj, ĉar la retejoj estas ligitaj. Krome, mi estis kunorganizanto de IJK en Visbadeno en 2015.

Ekde 2014 mi studas Etnologion kaj Sinologion en Friburgo. Nuntempe mi estas studanta en Nankingo en Ĉinio per intersanĝprogramo de mia universitato, kaj baldaŭ translokiĝos al Pekino, por fari praktikon antaŭ ol reveni al Germanio ĉi-somere.

·kune· (ĝis 1999 GEJ-gazeto aŭ GEJ-Gazeto) estas la membrogazeto de Germana Esperanto-Junularo. Ĝi aperas kiel interna revueto kadre de *Esperanto aktuell* kaj enhavas diverssternajn artikolojn, kiuj ĉefe celas junulajn esperantistojn.

Lingvokvizo

1. Falsaj amikoj estas paroj de vortoj en du lingvoj, kiuj aspektas aŭ sonas simile, sed estas malsimilaj laŭsignife. Traduku Esperanten:

1.1. Er nahm seine Angel und warf sie in eine Ecke.

1.2. Auf dem Landgut meiner Großeltern befanden sich viele Bienenstöcke.

1.3. Brauchst Du eine Lupe um die Stiefel im Boot zu finden?

2. Aforismo estas konciza, sencoriĉa eldiro, esprimanta principon aŭ penson rilatan al scienco, arto, moro aŭ kredo. Kompletigu tiujn aforismojn:

2.1. T. Tasso: Amo estas la sopiro je ...

2.2. F. Hebbel: Ni deziras esti amataj brutte, ...

2.3. Mikelanĝelo: La celo de arto estas ...

2.4. J. G. Herder: Kiaj estas ni, tiaj estos ...

2.5. R. W. Emerson: La vivo ne estas tiel mallonga, ke ne restu tempo por ...

3. Bringen Sie die Buchstaben in die richtige Reihenfolge: "en sacis im, kail stubia – lamgaj' ne al roko kansigis"

4. Finden Sie das Wort oder das Wortteil, welches als Schluss des ersten und als Beginn des zweiten Wortteils passt, z.B. okul – fandejo -> okulvitro, vitrofandejo.

4.1. neĝ – umilo

4.2. kuko – kotizo

4.3. vintro – ĉambro

5. Kiu objekto ne komenciĝas amfibie esti kvakanta kaj saltanta, sed vidigas informojn al uzanto?

6. Elektu la ĝustan esprimon el Proverbaro Esperanto de L. Zamenhof por la germana dirmaniero: "Man soll den Teufel nicht an die Wand malen".

a: Ne diru "hop" antaŭ la salto.

b: Oni ne elvoku lupon el la arbaro.

c: Por ĉiu faro estas horo.

Solvoj

1.1. Li prenis sian fiŝkanon kaj ŝetis ĝin en angulon.

1.2. Sur la bieno de miaj geavoj troviĝis multaj abelujoj.

1.3. Ĉu vi bezonas lupeon por trovi la botojn en la boato?

2.1. belo.

2.2. ne nete.

2.3. feliĉigi.

2.4. niaj infanoj.

2.5. ĝentileco.

3.1. "Ne scias mi, kial subita – Malgaj' en la koro naskiĝis" (El la poemo "Lorelej'" de H. Heine, tradukita de L. Zamenhof; legebla interrete che <http://tinyurl.com/zqalbd4>)

4.1. vent(o)

4.2. kotizo

4.3. dormo

5. ekrano

6. b (Oni ne elvoku lupon el la arbaro. Aŭ: Oni ne pentru diablon sur la muro)

Se vi, kara leganto, havas kontribuojn, bv. sendi ilin al punktor@live.at; se vi ne volas, ke via nomo aperos, sciigu nin.

Lernrunde Wien/U.S.

Solvo de la krucenigmo el la antaŭa numero

„MI PRI TIO SCIAS,
JA PRO TIO MI VENENIGIS VIN“.

MI	PRI	TIO	SCIAS,	JA	PRO	TIO	MI	VENENIGIS	VIN		
M	O	P	S	V	A	K	U	S	K	E	M
I	L	O	M	E	L	O	N	O	I	L	I
P	E	L	T	A	E	L	I	P	S	O	V
R	I	K	A	N	I	E	T	A	P	P	E
I	O	N	I	D	I	R	K	A	P	O	N
T	F	I	K	A	R	F	A	C	I	L	E
I	R	U	S	R	I	M	O	A	L	E	N
O	A	Z	K	O	S	U	S	O	N	I	
S	P	I	T	A	O	R	A	K	O	L	G
C	I	N	A	M	O	E	S	T	R	K	I
I	O	L	E	F	I	N	E	N	U	S	
A	S	P	L	E	J	S	T	A	T	I	V
S	E	B	O	R	O	B	O	M	I	R	I
J	A	R	B	O	B	E	N	O	L	I	N
A	T	O	M	O	N	O					
P	O	K	A	L	O	O	S				
R	I	R	E	T	A	S					
O	P	S	T	A	L	T					
T	O	L	O	V	I	V					
I	R	U	L	O	G	A	S				
O	K	U	P	I	O	R	O				

MI DEVAS
KONFEJA, KIE
MI ABDELIS
KON LA
NAJANARHO

Unu el la solvintoj, s-ro Waldemar Ebel el Krefeld, Germanio, (lotumita) – ricevos libron aŭ diskon laŭ sia propra elekto el: espo.link/stano aŭ espo.link/stanolibro

Elkora
gratulon!

La 15a Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken

Post unu jaro ni denove renkontiĝis en Saarbrücken, por kune festi la Novjaran Renkontiĝon en gaja kaj amika etoso.

La evento, okazinta de la 12-a de decembro 2016 ĝis la 3-a de januaro 2017, estas organizata de la asocio EsperantoLand. La ĉeforganizanto Lu Wunsch-Rolshoven kun pluraj helpantoj pretigis interesan jarfinan semajnon. Pri la programo zorgis Betti Maul, pri la tekniko okupiĝis Pjotr de Mulder kaj Klaus Rumrich. Al la programo multe kontribuis ankaŭ Ines kaj Christoph Frank. La NR-on partoprenis 196 geesperantistoj el 15 landoj ne nur el Eŭropo. Ĉeestis multaj familioj kun infanoj kaj gejunuloj ĝis 19-jaraĝaj.

Riĉa programo kontentigis ĉiujn ĉeestantojn. Ni povis ĝui diversajn prelegojn, diskutrondojn, laborgrupojn, atelierojn, kvizojn, diversnivelaĵojn Esperantolingvokursojn. Oni povis lerni ankaŭ la hispanan. Ne mankis riĉa libroservo, variaj tabloludoj, vesperaj filmoj, malstreĉiga gimnastiko aŭ ritme vigla zumbo, kurso de tango kaj ĉendancado. Intereson vekis plibonigo de memoro per la japana lingvo, budaisma plenkonscia meditado, balada kulturo de Feroaj insuloj, la libroarto-Orimoto kaj aliaj programeroj.

Ni eksciis, kiu inventis la komputilon kaj kial la homoj neas sciencon, kien iros Eŭropo post la breksiĝo, pri la dana filozofo Martinus, pri liberalaj religioj, pri Duolingo, pri la Edena ĝardeno, pri justa komerco, pri gravitaj ondoj, pri Esperanto en Afriko, pri perspektivoj de Eŭropa Unio kaj eĉ pri bano, duŝo kaj necesoj tra la mondo. Interesis nin matematika prelego pri senfineco, ĝiaj problemoj kaj paradoksoj, la historio de Kubo kaj Usono, la vivo sur strangaj mondoj kaj la vivo sur la orient-frisaj insuloj.

Ni diskutis pri monda politiko, pri enmigrantoj, pri disvastigo de Esperanto, pri ReVo (Reta Vortaro). La projekton "Unu leciono pri Esperanto, por ĉiuj lernejoj" proponis Lu Wunsch-Rolshoven. Pri la demando "Ĉu normalaj infanoj ankoraŭ ekzistas?" prelegis kaj diskutis Martin Markarian. Pri "Ĉu reguligita laŭleĝigo de kanabo estas dezirinda?" raportis kaj diskutis Markos Kramer. Gijom' Armid or-organizis seminarion pri "Vivi por feliĉi aŭ feliĉi por vivi?"

Okazis tradukateliero kun Brian Moon kaj István Ertl, konstruo de sorobano kun Kimie Markarian, Risko-kvizo kun Edy Van den Bosch, scienca kvizo por teamoj kun eksperimentoj kun Klaus Rumrich, skeĉoj de Mirejo Grosjean okaze de la jaro de lernado. Ni spektis bildprezentojn de Amri Wandel pri Slovakio, Slovenio,

Montenegro kaj pri Petra, la antikva mistera ĉefurbo en la jordana dezerto. Bernard-Regis Larue gvidis nin tra parkoj de Yellowstone kaj Colorado en Usono. Ulrich Brandenburg rakontis kaj montris interesajn bildojn pri Portugalio, kie en la jaro 2018 en Lisbono okazos la 103-a Universala Kongreso. Li donis al ni emon partopreni ĝin.

Ankaŭ la infanoj ĝuis tre riĉajn programerojn en multaj atelieroj. Interesis ilin pretigado de pilkoj por ĵonglado, origamio, fabrikado de strigoj kaj aŭtoj el kartono, pupetoj el ŝtofoj. Ne mankis rostado de bananoj kun ĉokolado, preparado de filmeto farita el fotoj, poŝtranĉiloj, kantado, ĵonglado, feltumado kaj ornamo de kandelinoj. La plej malgrandaj kun entuziasmo sekvis Mazi-kurson. Plaĉis al ili ludado kun samaĝuloj kaj libera petolado. Dum la paŭzoj virinoj trikis, iuj komputilis, legis, kartludis aŭ babilis ĉe glaso da vino, biero aŭ kafo.

Estis prezentitaj fotoj el la pasintjara NoRo, Beletra Almanako. Vespere ni ĝuis pup-teatraĵon: "Avino! kriaĉas Filipo" fare de Christoph Frank, koncerton de ĴeLe kun akompano de la kubano Geomar. Plezure koncertis ankaŭ Gijom' kaj Kim. Dum la Internacia vespero prezentiĝis niaj talentuloj. Ni ĝuis pian-, kontrabas-, violon-, kaj flut-ludadojn, ĵongladon, ĥor-kantadon, dancadon, kanĵi-kvizon kaj skeĉojn de István Ertl. Ĉe la fino Lu Wunsch-Rolshoven dankis al ĉiuj kontribuintoj kaj al la partoprenintoj de la aranĝo.

Gaje ni bonvenigis la Novan jaron per tosto, kisoj kaj bondeziroj de ĉio bona por la jaro 2017, esperante denove renkontiĝi jarfine en NR.

Liba Gabalda



La urbodomo en Saarbrücken



15-a NR
2016/2017



Saarbrücken



Iom pri la vivo sur la
orientfrisaj insuloj

Klopodo pri multimedia prelego por
okuloj, nazo, lango, stomako kaj hepato



Kie povas ekzisti vivo
ekstera?

